Laŭ tiu deirpunkto, JEFO decidis reaktivigi sian reton de regionaj kunordigantoj. Ĉiu regiona kunordiganto respondecas pri rekta kontaktado kun junuloj en sia regiono, pri regula kontaktado kun lokaj grupoj kaj pri organizado de regionaj agadoj por, per kaj cele al junuloj. Se regiona kunordiganto ekscias pri junulo en sia regiono, tiam estiĝas interŝanĝo de adresoj. La junulo ricevas la adresojn de la kunordiganto kaj de proksima loka grupo dum la proksima loka grupo ricevas la adreson de la junulo. Tiel oni povus eviti situaciojn, per kiuj JEFO ekscias el eksterlanda aktivulo pri ekzisto de junulo en iu regiono de Francio.


Kelkfoje aŭdeblas la esprimo "loka junulara grupo". Ĝi ne signifas, ke kreiĝis nova asocio nur por junuloj. Simple estas maniero nomi la junulojn, kiuj ene de loka grupo havas apartajn agadojn, aliajn kunvenojn kaj foje rabatitan kotizon. Tiaj

apartaj agadoj ne celas disigi la lokan grupon sed proponi aldonajn aktivecojn specife allogajn por pli junaj homoj. Por ĉiuj aktivecoj pli facilas interrilati sendepende de ia aĝlimo ĉar estas unu sama grupo.

Krom la nura plezuro renkontiĝi inter samaĝuloj, JEFO celas prepari la estontecon de la franca esperanta movado per serĉado kaj trejnado de aktivuloj. Ju pli juna oni komencas praktiki Esperanton, des pli longe oni restas en la movado. Tamen ne eblas krei esperantistojn el nenio. La fekunda grundo de la lokaj grupoj estas tereno, kie ni povas flegi novulojn por integri ilin al nia komunumo. Ĉiu trovu projekton partoprenindan, ĉu en sia loka grupo, ĉu en sia regiono, ĉu en sia lando, ĉu sur nia planedo. Esperanto estas vivanta lingvo por viglaj homoj kontaktemaj. Tian ni uzu ĝin por helpi eĉ modeste la homaron.

Por helpi la lokajn grupojn ni proponas al ili aboni la bultenon JEFO Informas por trovi informojn pri la agadoj interesaj por junuloj. Ne nur naciajn agadojn ni plenumas sed ankaŭ diversajn lokajn aŭ regionajn, kiaj estas la Gastronomiaj Semajnfinoj. La reaktivigita reto de regionaj kunordigantoj celas rilati rekte kun lokaj grupoj kaj kun la junuloj, kiujn konigos la lokaj grupoj. Per reciproka helpado la kunordigantoj kaj la lokaj grupoj trovos kaj trejnus novajn aktivulojn por la franca esperanta movado.

FAGOT Alain



AGI EFIKE

INFORMI VALORE

NI KREU ARGUMENTARON

Ni ĉiuj spertis, kiom malfacile estas respondi ĝuste kaj efike abruptan (kaj eĉ tre simplan) demandon aŭ kritikon kontraŭ Esperanto.

La sekvanta projekto celas ĝuste alporti rimedon al tiu problemo. Tio postulas la kunlaboron de kiel eble plej multnombraj legantoj.

Ne hezitu, ne prokrastu, **respondu tuj!** Ni bezonas viajn ideojn, viajn sugestojn.

CELO

Disponigi al ĉiuj aktivaj esperantistoj seriozajn konvinkajn kaj trafajn informojn, esprimojn kaj argumentojn por ĝuste informi pri Esperanto rebati kaj kontraŭi al la plej kutimaj kritikoj:

- ĉar la koncernaj faktoj kaj argumentoj estas dissemitaj en dekoj da libroj, broŝuroj, kaj malfacile retroveblaj;

- ĉar tro ofte ni ne subite scipovas trovi ilin, kaj efike respondi.

Pro tio, eldoni slipojn kun nur unu temo:

- frontflanke, titoloj de ĉiuj argumentoj;
- dorsflanke, teksto por ĉiuj argumentoj kun faktoj, datoj, citaĵoj, referencoj ktp.

PRAKTIKE

Via respondo estu persona aŭ sintezo farita de laborgrupo:

- vi elektu unu temon (ekzemple demando-kritiko)
- ĉiuj laborgrupanoj respondu skribe;
- legado de ĉiuj eblaj respondoj;
- kritikoj, proponoj, aldonoj ktp;
- enlistigo de ĉiuj respondoj.

Tio postulas la jenon:

- skribi nur sur unu flanko de la paperfolioj;
- noti la referencon (ekzemple, A, B, C aŭ 1, 2, 3)
- noti la titolon (ekzemple, Esperanto = sen kulturo).

NI MALKOVRIS,

1) ke bona respondo aŭ informo devas:

- esti mallonga,
- krei miron pozitivan, admiron,
- krei surprizon,
- veki intereson, scivolemon,
- provoki, estigi demandojn;

2) ke bona respondo devas eviti mispaŝojn:

- ekzemple, utiligo de "danĝeraj", malutilaj esprimoj (*langue artificielle, fabriquée* ktp);

3) ke ni devas atenti la psikan efikon de:

- nia ekstera aspekto,
- niaj tonoj kaj parolmaniero,
- la reagoj de la kunparolanto.

Ni intencas studi la janajn temojn:

(Oni ne hezitu proponi aliajn temojn)

- **E1 - Enkonduki** diplomate, lerte la temon "espéranto" en konversacion kun ne konatoj, ekzemple sur publikaj lokoj:

- deĵoranto ĉe Esperanto-budo, en salono, festo
- en metroo, trajno, magazeno ktp;

- **I1 - Intervjuo**: prezenti Esperanton per nur 1 aŭ 2 frazoj, ekzemple:

- okaze de partopreno en ludo ĉe televido aŭ en alia okazaĵo,
- okaze de abrupta intervjuo.

TRAJAJ RESPONDOJ KONCERNE

- Kritikojn

- sub la rubrikoj: - **K1 Langue artificielle**, - **K2 Sans racine, sans peuple, sans pays**, - **K3 Sans histoire, sans passé**, - **K4 Sans culture**, - **K5 C'est un échec**;

- Demandojn

- sub la rubrikoj: - **D1 Quelle langue est l'Espéranto?** - **Vocabulaire, grammaire**, - **D2 Combien d'espérantistes dans le monde, en France?** - **D3 Pourquoi l'Espéranto n'a-t-il pas mieux réussi?** - **D4 Pourquoi l'Espéranto, puisqu'il y a l'anglais?**

Aperos tre valora dokumento, se multaj legantoj partoprenas en la projekto, sendante siajn personajn respondojn al la jena adreso: Jean MARIN 9, rue Adrien Lejeune, 93170 BAGNOLET (tel: 01 43 63 87 48)

Grava atentigo.

- Skribi sur paĝo en 21X29,7-centimetra formato.
- Skribi nur sur unu flanko de ĉiu paperfolio.
- Indiki klare la referencon (ekz.: E1, I1, K2, D3).
- Indiki klare la titolon (ekz.: *Langue artificielle.*)
- Skribi tre legeble, aŭ prefere tajpi.
- Indiki ĉiujn necesajn referencojn (titolon de libro aŭ de artikolo, paĝon, aŭtoron).

Precizigo.

Oni bonvolu redakti la respondojn **Franclingve**, ĉar ili estas definitaj por Francoj aŭ Franclingvanoj. Estonta Esperanto-traduko kompreneble sekvos, se tio estos necesa.

Homaj Rajtoj

Les associations de défense des droits de l'homme célèbreront le 10 décembre 1998 le 50ème anniversaire de la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme... Un texte qui nous concerne, en tant qu'espérantistes, dans la mesure où notre mouvement va dans le même sens... et aussi malheureusement dans la mesure où ses violations portent atteinte à nos activités.

Antaŭ dekkvin jaroj, nelonge post la fondiĝo de UNO, naskiĝis la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Post la teruraĵoj de la dua mondmilito, necesis laŭte aserti, ke ekzistas nepreskripteblaj rajtoj propraj al ĉiu homarano. La longa antaŭparolo de tiu Deklaracio klamas, ke "la alveno de mondo, kie la homoj povos libere paroli kaj kredi, liberigitaj de teruro kaj de mizero, estas la plej nobela sopiro de la homo".

Estas interese konstati ke unu jaro kaj duono pli frue, UEA aldonis al sia statuto alineon, laŭ kiu "la respekto de Homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo". Ja gravis restarigi tiun principon fine de milito, en kiu la internacia Esperanto-movado havis certan moralan respondecon. (Vidu tiuteme "la Danĝeran Lingvon").

Fakte en pluraj aspektoj la ideo de tiu Deklaracio kongruas kun la Esperanto-movado. La koncepto mem de universaleco estas komuna... kaj ankaŭ la riproĉoj pri ĝi ! Kiom ofte ni esperantistoj

aŭdis, ke nia lingvo estas tro okcidenta por pretendi al universaleco ! Precize la samon oni riproĉas senĉese al la Universala Deklaracio... Almenaŭ oni povas respondi ke la malĝustajtoj kiuj rezultas de ĝia malobservo (aŭ de neekzisto de komuna lingvo) estas "universalaj" : homo torturata egale suferas en kiu ajn kontinento; same la lingvaj problemoj tiel forte koncernas Eŭropanojn, Azianojn, Afrikanojn...

Plie ni legu atenteme la Deklaracion. La 26a artikolo diras jenon : "(...) Edukado devas helpi al interkompreniĝo, toleremo, kaj amikeco inter ĉiuj nacioj(...)" Ĉu tio ne precize estas la celo de la Esperanto-movado ?

Ofte la homrajtoj de esperantistoj estis neitaj : cenzuro, persekutoj... Pli proksime al ni, la libera cirkulado garantiita de la artikolo 19, estas minacata en nia lando, kie eksterlandanoj ne ĉiam estas bonvenaj... Ekzemple, kelkaj el ni bone memoras, ke afrikaj esperantistoj devis rezigni pri sia partopreno en Festo lastsomere pro tio.

Dum la tuta jaro 1998 - kulmine la 10an de decembro, dato de la 50-jariĝo de la Deklaracio - ĉiuj asocioj por homrajtoj strebados por festi kaj informi pri ĝi... Ĉu ni esperantistoj kontaktu tiajn asociojn en nia urbo por diri nian subtenon, diri ke la Esperanto-movado havas similajn celojn... kaj eĉ laŭeble partopreni iun lokan iniciativon ?

Rozenn Texier-Picard



TEJO - Konkursoj

Desegnado

Jam pasis kelkaj tagoj de la limdato por la infanaj konkursoj de TEJO. La sento en tiu-ĉi momento estas sufiĉe pozitiva. Ĉirkaŭ cento da desegnaĵoj alvenis al la CO. Tio estas laŭ mi sufiĉe multe se oni konsideras, ke unufoje TEJO organizas similan aktivadon. De tiu ĉi relative alta partopreno oni povas kuraĝe konkludi, ke TEJO trafis punkton, kiuinteresas al la esperantistaro. Laŭ la vidpunkto de TEJO estas grava sukceso unuavice ĉar ĝis nun la rilato de la junulara movado kun la infanaro (esperantista aŭ ne) estas sufiĉe nula. Tiu-ĉi konkurso povas esti iniciata instigo por pluagadi en la infana kampo.

Nuntempe komisiono starigata en Kolonjo pristudas la desegnaĵojn kaj baldaŭ estos publikeblaj la rezultoj de tiuj-ĉi unuaj desegno-konkursoj de TEJO por infanoj.

Mi volas ankoraŭ memori al vi, ke la desegno-konkursoj de TEJO estas planataj en unujara ritmo, tiel ke en la printempo de 1999 estos denove ŝanco por tiuj kiujmaltrafis la nunan aŭ deziras denove partopreni.

Konkurso pri satiroj

Sendube restas ankoraŭ multo por fari en la kultura flanko. Kiel planite TEJO daŭrigos sian konkursan projekton per la duaj konkursoj. La dua el tiu serio de konkursoj estos "Satiroj". Satiro estas en nia kazo mallonga rakonto kun ironia senco.

La temo estos preskaŭ libera. Mi diras preskaŭ ĉar malgraŭ ke la partoprenanto rajtos memstare elekti la temon, ĝi devos plenumi certajn kondiĉojn :

- Ĝi tuŝu temon de intereso por la junularo aŭ estu socie aktuala.

- Rajtas kompreneble rilati al esperanto aŭ al la movado sed devos tamen atenti la alia kriterio.

La verkoj estu origine en esperanto verkitaj.

La partoprenantoj estu maksimume 30 jaraĝaj.

La longeco de la verkoj limiĝu al minimume 4 DIN A4 paĝoj kaj maksimume al 8 DIN A4.

Ĉefaj premioj estos 3 :

- la unua : 300GM + PIV + Rokgazet' abono ekde la 7a numero + kasedo de Vinilkosmo kompilaĵo (1 aŭ 2 laŭ memelekto).

- la dua : 150 GM + PIV + kasedo de Vinilkosmo kompilaĵo (1 aŭ 2 laŭ memelekto).

- la tria : PIV + kasedo de Vinilkosmo kompilaĵo (1 aŭ 2 laŭ memelekto).

Krome la kvara kaj kvina plej bonaj ricevos KD de

Leclerq (konata kiel JoMo kaj la mamutoj), kaj la sesa kaj sepa plej bonaj ricevos kasedon Vinilkosmo Kompilaĵo.

GRAVA INFORMO :

Ĉar la reago de sponsoroj estis ĝis nun sufiĉe pozitiva kaj estas ebla ankoraŭ plua sponsorado, se la partopreno ankaŭ estas kontentige alta estos granda probableco ke TEJO altigu la premiojn 1an kaj 2an al 400 GM kaj 200GM respektive. Dependas de via verkemo !

La limdato estos la 30a de oktobro de 1998

Partoprenu !

Metu la verkon en koverto kaj fermu ĝin. Poste metu tiun koverton en alia kune kun papero kun via nomo, adreso, aĝo kaj ĉio, kio vi konsideras grava pri vi kaj sendu al la

Centra Officejo

Nieuwe Binneweg 176

NL - 3015 BJ Rotterdam


Indiku sur la koverto "Por la satiroj-konkurso"

La konkursoj de TEJO estas subtenataj de SAT, EUROKKA, Jomo kaj la Mamutoj, Fondaĵo Soler el Valencio kaj Fondaĵo Fame.

Do, verŝajne mi tute ne bezonas mencii kiom grava estas la partopreno via en tiuj-ĉi konkursoj. Se vi iam kredis ke vi estas la esperantista verkisto de la estonto ne dubu, prenu skribilon kaj verku la plej spican satiron!

Ankaŭ menciendas ke post la fino de tiu-ĉi konkursa projekto (fino de 1999) TEJO eldonos (se tio eblas) la verkojn libroforme. Se vi volas iĝi mondkonata partoprenu !

Miquel Gomez i Besos



Korespondpetoj

Alexandre F. TRAVASSOS
Sao Paulo, Brazil

alexan@mailmac.macbbs.com.br

Mi estas 27 jara viro, komencanta esperantisto. Mi estas muzikisto kaj ludas klarineton en orkestro. Mi volas havi amikojn ĉirkaŭ la mondo kaj mi deziras skribi kaj evolui en esperanto ĉar mi amas ĝian filosofion.

Krayg MEULEN
24 Firfield Street
Bristol BS4 3AL
Britio

krayg@cableinet.co.uk

Mi estas 26-jara viro. Intereso: ekologia movado, rajtoj de bestoj, esperanto, kooperativaj aferoj, jonglado, biertrinkado kaj kuirado vegetarana. Mi korespondos kun iu ajn, speciale kun homoj el Orienta Eŭropo, Rusio kaj Ĉinio. Per ret- aŭ paperpoŝto.

Mi havas TTT-pagxon:
<http://wkweb5.cableinet.co.uk/krayg/>

Vadim BISEROV
Poŝtkesto 8384
614105 Perm, Rusio

wwb@perm.raid.ru
FIDONET <2.5054/12.40>
<http://www.raid.ru> (Ruslingva)

Mi estas 29 jaraĝa esperantisto el Rusio. Mi tre deziras konatiĝi kun geesperantistoj de tutmondo. Mi interesas pri: turismo, vojaĝoj, speleologio, gastigado, subakva naĝado, historio, kulturo kaj lingvo de Mongolio, Eŭropaj landoj, komputila desegno kaj enpaĝigo, lingvoj (angla, bulgara), gitarludo. Mi volonte estos via gastiganto en Rusio, kaj volonte interparolos kun vi retpoŝte.

Gilvan BROGINI
Serv. Abilio Silva, 220
Florianopolis - SC
88036.240 - BRAZIL

gilvan@ccj.ufsc.br

Mi estas 21 jara viro, loĝanta en Florianopolis, ŝtato Santa Catarina, belega urbo (kaj insulo!) kiu troviĝas 710 km sude Sao Paulo. Mi ankaŭ estas komencanto, sed mi tre volas daŭrigi la esperanto-studadon. Mi nuntempe studas Juron ĉe la

Universitato de Santa Catarina (UFSC), kaj mi ŝatus trovi geamikojn tra la tuta mondo!
Skribu ret-poŝte aŭ paper-poŝte al mi!

Mr. Markus RAHKOLA
JYPOLY
Finland

marrahk@jytol.fi

Mi estas 22 jara komencanta esperantisto, el Jyvaskyla. Mi serĉas komencantajn gekorespondantojn. Mi studas informoteknologion ĉe Jyvaskyla Polytechnic.

Den DROWN
3500 Washington Street, #607-A
Hollywood, FL 33021

ddrown@americantelnet.com
<http://www.geocities.com/westhollywood/heights/7742>

Mi estas 28 jara, samseksema viro. Mi deziras korespondi kun sam/ambaŭseksemaj homoj de la tuta mondo. Mi estas mez-nivela esperantisto kun deziro plibonigi mian esperantan kapablon kaj samtempe renkonti aliajn geajn homojn. Mi havas amaton kiu estas komencanta esperantisto. Miaj intereso estas: lingvoj (franca, usona gestlingvo, hispana, kaj germana), velboatoj, aŭto (Corvettes), kaj komputilprogramado.

Hector ORTEGA
6124 Montezuma Rd. #C204
San Diego, CA 92115
Usono

hortega@rohan.sdsu.edu

San Diego troviĝas en suda Kalifornio. Mi estas 21-jara fraŭlo, studento pri lingvistiko kaj la hispana lingvo. Mi sciipovas Esperanton mezbone kaj deziras plibonigi mian nivelon. Interesiĝas pri: Promociado kaj Instruado de Esperanto, lingvoj (mi iomete parolas la francan, kaj mi nun lernas la rusan), ŝako, muziko (rokmuziko kaj klasika). Mi ankaŭ estas komencanta filatelisto. Do, oni certe rajtas sendi al mi paperpoŝton.

Steve SIROIS-FOURNIER
881, rue Gallienne
Sept-Iles QC
G4R 4B1

KANADO

saf1@gpu.srv.ualberta.ca

Mi estas 21 jara viro, kaj mi estas el Kanado. Mi studas en la Universitato de Alberta. Mi volas korespondi kun knabinoj inter 18-23 jaroj el Tunizio, Ruslando, Ukrainio, Hungario, Aŭstrio, Japanio, Vasko, Holando, Skotlando, Egiptio, Israelio, Greklando, Svisio, Danio, Pacifikaj Insuloj, Antiloj. Mi amas bestojn, muzikon internacian kaj sportojn.

Vandilson TRINDADE
rua da Gloria, 260, Periperi
CEP: 40725-650 Salvador - Bahia
Brazilo

Mi estas fraŭlo, 17-jara, studento en mezlernejo. Esperanta komencanto. Mi sciipovas legi kaj skribi plimalpli bone kun helpo de vortaro. Mi loĝas en Salvador, ĉefurbo de ŝtato Bahia. Unu el la plej belaj urboj el mia lando, tre konata ĉie, pro muziko kaj muzikistoj mi kredas. Intereso: Lingvoj, turismo, muzikoj, scienco, geografio, ĝenerala kulturo, religio, poŝtkartoj, korespondi kun novaj amikoj ĉie. Mi sciipovas legi kaj skribi esperantan, anglan kaj portugalan (kompreneble). Certe mi respondos vin. Mi preferas korespondi paperpoŝte.

Iuri GASPARI
Rua Joao Pereira da Rosa, 2, Arrozeias
2860 Alhos Vedros
Portugal

nop40906@mail.telepac.pt

Mi estas 20 jara viro, Mi loĝas proksime de Lisbono, en Portugalio.

Junko EGAMI
Kasuga 7-8-2 101
Kumamoto-Shi
Kumamoto 860
Japon

Juna sinjorino deziras korespondi kun franca junulino. Mi loĝas en Japanio, estas 26jara, kaj havas filineton 2jara.



Kalendaro

JUILLET

AOUT

21 - 25 JUILLET

—> Croatie / Kroatio

—> Savudrija

- 5e rencontre maritime internationale, organisée par l'association des jeunes espérantophones Croates : conférences et discussions-débats sur la mer, programmes distractifs, sport, etc.

- 5a MIRO (Mara Internacia Renkontiĝo) : konferencoj kaj diskut-debatoj pri la maro, distraj programeroj, sporto, ktp.

Inf : Kroatia esperanto-Junulara-Asocio - Amruševa 5/I - HR-10000 Zagreb - tel/fax : +385 1 48 101 52 - <http://pubwww.srce.hr/keja>

25 - 01 JUILLET-AOUT

—> Croatie / Kroatio

—> Rijeka

- 54e Congrès International des Jeunes, organisé par TEJO (Tutmonda Esperanista Junulara Organizo). Thème : "Les médias - créateurs de culture de masse". Participation de centaines de jeunes de toute la planète;

- 54a IJK (Internacia Junulara Kongreso). Temo : "Amaskomuniloj - kreantoj de amaskulturo". Partopreno de centoj da junuloj el la tuta planedo.

Inf : Kroatia esperanto-Junulara-Asocio - Amruševa 5/I - HR-10000 Zagreb - tel/fax : +385 1 48 101 52 - <http://pubwww.srce.hr/keja>.

27 - 31 JUILLET

—> France / Francio

—> Paris

- Pré-congrès officiel du congrès mondial d'Espéranto. Programme : visite de Paris,...

- Oficiala antaŭkongreso de la 83a UK. Programo: vizito de Parizo, Versajlo, katedro de Chartres,...

Inf : Espéranto-Ile-de France - 4bis, rue de la Ceresaie - 75004 Paris

01 - 08 AOUT

—> France / Francio

—> Montpellier

- FESTO, programme jeune du 83e Congrès Mondial d'Espéranto;

- FESTO, junulara programo de la 83a UK (Universala Kongreso)

10 - 16 AOUT

—> Suède / Svedio

—> Lesjöfors

- Festival Culturel International : musique, théâtre, littérature,...originaux en Espéranto, dans un cadre vert (forêts, lacs, colline et air frais!). Anciens talents mais aussi nouveaux à découvrir.

- KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) : muziko, teatro, literaturo,... en verda medio.

Inf : Janko Luin - Myggdalsvögen 123 - SE-135 42 Tyresö - janko@esperanto.se

10 - 16 AOUT

—> France / Francio

—> Taizé

- Campement oecuménique de jeunes.

- Junulara Ekumena Tendaro (JET)

Inf : Pastro Bernhard Eichkorn - Romaeusring 20 DE-78050 VS- Villingen - Tel : +49-7721 22073 ; fax : +49-7721-22074

12 - 19 AOUT

—> France / Francio

—>Plouezec (près de Paimpol, Bretagne)

- Stage international d'espéranto. Cours pour débutants et pour ceux qui maîtrisent déjà les bases de la langue (4h/jour).Egalement : initiation aux danses bretonnes, pêche à pied, chants, jeux pour enfants,...

Inf : ESPERANTO 22 - Marie et Roger EON - 5, Kervilin Izelan - 22470 Plouezec - tel/fax : 02 96 22 77 17 - rogeon@club-internet.fr

Calendrier

17 - 27 AOUT

- > Russie / Rusio
- > Moscou

- Campement de jeunes espérantophones.
- OkSEJT (junulara E-tendaro)
Inf : Grigorij Arosjev
ab. ja. 31 - RU-117071 Moskva

13 - 22 AOUT

- > Italie / Italio
- > Blera (Viterbo)

- 4a Internacia Laborbrigado (senpaga)
Inf : Pier Luigi Cinquantini - via Dante Alighieri
n.2
IT-01010 Blera (VT) - tel/fax : +39 761 479503
Mobile : +39 338 9484790 - pcinqua@tin.it

29 - 05 AOUT-SEPTEMBRE

- > France / Francio
- > Sète

- Semaine internationale d'espéranto
- Internacia Esperanto-Semajno
Inf : Esperanto - 5, rue du Docteur Roux 34090
Montpellier - tel : 04 67 54 15 43

SEPTEMBRE

04 - 06 SEPTEMBRE

- > France / Francio
- > Isques (près de Boulogne-sur-Mer)

- 5e week-end gastronomique sur le thème du
chocolat (organisé par JEFO)
- 5a gastronomia semajnfino organizata de JEFO
pri ĉokolado.

24 - 27 SEPTEMBRE

- > Autriche / Aŭstrio
- > Bad Gaisern

- Rencontre de jeunes en montagne
- Montkabana Renkontiĝo
Inf : Aŭstria Esperanto-Junularo - Poŝtfako 804 -
AT-8011 Graz.

OCTOBRE

02 - 04 OCTOBRE

- > France / Francio
- > Diebolsheim (Elzaco)

- 6e week-end gastronomique organisé par
JEFO. Thème : choucroute et quiches.
- 6a gastronomia semajnfino organizata de JEFO
.Temo : saŭkraŭto kaj kiŝoj.

03 - 10 OCTOBRE

- > Espagne / Hispanio
- > Calafell (Tarragona)

- 6e Semaine Internationale d'Espéranto.
- 6a Internacia esperanto Semajno
Inf : HFEA - Apdo 15027 - ES-08080 Barcelona
tel : +34 3/727/50-21

04 - 10 OCTOBRE

- > Hongrie / Hungario
- > régions de Balaton, Szekszard, Villany

- Semaine hongroise d'espéranto
- Hungaria Esperantista Semajno
Inf : Vojaĝoficejo "Espertur" - Tatra utca 4 HU-
1136
Budapest - tel : +36-1-2680306 - fax : +36-1-
2680331 - esperantohea@mail.c3.hu

11 - 18 OCTOBRE

- > Hongrie / Hungario
- > Budapest

- Séminaire de TEJO sur le thème : "Droits
linguistiques - politique linguistique";
- TEJO-seminario pri la temo : "lingvaj rajtoj -
lingvo-politiko"
Inf : Lariko Golden - Damjanich u. 1/c. 1.8
HU-8200 Veszprém - tel : +36/88/424-339 ; fax :
+36/1/282-88-85 ; golden@osiris;elte.hu

21 - 25 OCTOBRE

- > France / Francio
- > En Ariège et près de Toulouse

- 7e pré-week-end et week-end gastronomique
organisés par JEFO sur le thème du pain et du
cassoulet;
- 7a gastronomia antaŭ-semajnfino kaj
semajnfino organizataj de JEFO pri la temoj
"pano" kaj "munjetoj".

Des dizaines d'autres dates de rencontres sont
disponibles sur la page web de JEFO :
www.esperanto.org/jefo

KRUCVORTOJ

HORIZONTALALE

1. Part' de aŭto
2. Subtrak' - Kreanto de la unua PIV (Plena Ilustrita Vortaro)
3. Hom', kiu ne apartenas al pastraro aŭ monaĥaro. - Antaŭ dua
4. Mamul' vivanta en la maro. - Longa produktaj' uzata por kudrado, trikado aŭ teksado.
5. Kapabl(a), per ĝusta uzado de akiritaj scioj, klare juĝi kaj bone taski la aferojn. - Tio estas.
6. Observi por malkovri - Prepozicio
7. Felo.
8. Parto - Plac' en la antikvaj helenaj urboj.
9. Pronomo - Grimpoplant'.
10. Far(i) pli granda.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1		■					■		■	
2						■				
3					■	■				
4				■						■
5	■		■					■		
6								■		
7							■		■	
8		■				■				
9	■				■					■
10										

VERTIKALE

- | | |
|---|--|
| <ol style="list-style-type: none"> 1. Substanco uzata por gustigi nutraĵojn - Interjekcio 2. Amema - Konjunkcio aŭ sufikso. 3. Tut' de la konsciaj kaj nekonsciaj spiritaĵoj - Fenomenoj - Kapti ion per sia mano. 4. Konjunkcio. - Ti(o), kio helpas kompreni. | <ol style="list-style-type: none"> 5. Prepozicio - Plantparto ordinare kolora kaj ofte bonodora. 6. Spirebla gaso. - Artikolo. 7. Kunligi per fadeno. - Ajnu' 8. Senutile. - Longa aŭ ripetita ag' 9. Mikskolora. - pronomo 10. Edzino de Krono. - Ir(i) eksteren. |
|---|--|

Solution dans le prochain numéro

Vous pouvez envoyer la solution de ces mots-croisés à la rédaction. Il n'y a rien à gagner (cette fois-ci), mais votre nom apparaîtra parmi les noms des gagnants. (s'il y en a).

**A NOTER : ENVOYEZ VOS CONTRIBUTIONS POUR LE
 PROCHAIN JI AVANT LE 18 AOUT 1998
 ET PAR COURRIER**

ADRESARO

Centra Oficejo / Siège social
4bis, rue de la Cerisaie
75004 Paris (M° Bastille)
Tél : 06 12 11 17 82

Komitatanoj de JEFO / Membres du Conseil d'Administration

ESTRARO :

Bruno Flochon (prezidanto/président) 6C av de l'Hippodrome 69890 La Tour de Salvagny. Tél+fax : 04 78 48 00 40 [R]
Mobile : 06 60 58 00 40 — bflochon@esperanto.org

Olivier Moreau (kasisto / trésorier) 48, rue Raffet 75016 Paris Tél : 01 42 88 51 58 [R] — omoreau@esperanto.org

Pascal Lécaille (help-kasisto / trésorier adjoint) BP 3019 69394 Lyon Cedex 03 Tél+fax : 04 72 36 07 14 [R]
(CR Rhône-Alpes) pascal.lecaille@wanadoo.fr

Cédric Forgeau (sekretario / secrétaire) 8, rue des Hérಿದೆaux 69008 Lyon Tél : 04 78 01 15 97 - Fax : 04 78 00 20 35
cedric.forgeau@wanadoo.fr

Flavie Audibert 1, rue Henri Say 92600 Asnières Tél : 01 47 93 15 04

Yves Bachimont (CR Normandie) 106 rue d'Orléans 14000 Caen Tél : 02 31 75 14 74 —
yvesbachimont@minitel.net

Philippe Bérizzi 17 allée JB Clément 78570 Andrésy Tél : 01 39 70 78 15 [R] — pberizzi@sky.fr

Vincent Charlot (partis politiques) 10, square Savorgnan de Braza 94310 Orly Tél : 01 48 92 63 79 —
esperant@worldnet.fr

Ludivine Delnatte 8, impasse de la Gayonne 34500 Béziers Tél + fax : 04 67 11 20 59

Alain Fagot (rencontres gastronomiques) Egelantiersstraat 12b NL-1015 PL Amsterdam Tél : +31 20 6265 509
Alain.Fagot@cwi.nl

Catherine Giangrossi (infanoj kaj Krokodileto) 1, rue Trarieux 69003 Lyon Tél + fax : 04 72 36 07 14 [R]
pascal.lecaille@wanadoo.fr

David Hromada 14 rue Louis Bouchet 93220 Gagny Tél : 01 43 32 86 78 — veszko@aol.com

Emilie Joly Ch des arènes 13430 Eyguières Tél/fax : 04 90 59 84 90 - emmb.joly@wanadoo.fr

Didier Loison (CR Bourgogne) 15, rue M. Emmanuel 21000 Dijon Tél : 03 80 43 44 79 [R] didiloison@aol.com

Sylvie Roques (CR Midi-Pyrénées) 8, rue J. Soula 31240 Saint-Jean Tél : 05 61 35 84 44 - Mobile : 06 81 58 71 03
Sylvie.roques@wanadoo.fr

Karine Texier (CR Bretagne) 4, rue Cours Kennedy 35000 Rennes Tél + fax : 02 99 59 69 08 -
karine.texier@hol.fr

Magali Texier (relations franco-allemandes) Hafenstr. 39 / Zi. 301 DE-68159 Mannheim Tél : +49 621 10 68 62
magali@rumms.uni-mannheim.de


Laurent Vignaud (CR Pays de la Loire) 25, chemin de la Brosse 49130 Les Ponts-de-Cé Tél : 02 41 69 70 12
Mobile : 06 12 11 17 82 - Minitel : 3614 CNX*JEFO49 — laurent.vignaud@wanadoo.fr

CR = Coordinateur Régional

[R] = répondeur

esperanto

Le saviez-vous



Il existe une langue connue par des millions de personnes, parlée sur les cinq continents et accessible à tous

Une langue pour partir au bout du monde...

Langue neutre, elle n'appartient à aucune nation mais à tous les peuples. Celui qui la parle peut rencontrer beaucoup de monde en voyageant, lors de festivals, de rencontres ou même par correspondance...

L'espéranto, tout le monde peut l'apprendre

- des règles de grammaire sans exception,
 - aucun verbe irrégulier,
 - des racines que l'on retrouve dans de nombreuses langues,
 - des familles de mots faciles à construire et à retenir
 - un vocabulaire riche, précis et nuancé,
 - des règles de prononciation très simples,
 - donc une langue beaucoup plus rapide à apprendre que toutes les autres !
- Et si vous voulez apprendre d'autres langues, l'espéranto vous y aidera...

Une association de jeunes pour l'espéranto

Espéranto-Jeunes (JEFO) réunit des espérantophones de toute la France pour faire connaître l'espéranto, en particulier auprès des jeunes, informer sur la culture espérantophone (livres, musique, spectacles...), les moyens d'apprendre la langue et les prochains événements en France et dans le monde.

L'association organise aussi des rencontres, festivals et week-ends gastronomiques tout au long de l'année. Profitez-en pour découvrir la langue internationale espéranto et prendre un bain linguistique !

L'espéranto, une vraie culture vivante

L'espéranto vit pleinement pendant les festivals, rencontres et congrès organisés tout au long de l'année dans de nombreux pays. Des troupes de théâtre, des chanteurs, des groupes de musique s'y produisent. C'est aussi l'occasion de découvrir les derniers livres, revues et disques compacts en espéranto. Se réunir, danser, discuter, rire, échanger des idées... dans une ambiance vraiment internationale.



PASPORTA SERVO

Un autre tourisme : direct et convivial

Le réseau d'hébergement gratuit «Pasporta Servo» permet, pendant les voyages, de connaître le pays visité et ses habitants.

En effet, plus de 1500 espérantophones de 70 pays sont volontaires pour accueillir des jeunes du monde entier.

Vous pouvez ainsi passer la nuit dans une famille et découvrir ce qui aura échappé aux autres touristes, tout simplement en parlant en espéranto avec vos hôtes.

Espéranto-Jeunes - 4 bis, rue de la Cerisaie - 75004 PARIS

Internet : <http://ttt.esperanto.org/jefo> • jefo@esperanto.org

ĈOKOLADA Semajnfino

- () mi estas vegetaran-in-o
- () baza kotizo (studento, senlaborulo...) 180 FRF / 27,20 XEU
- () baza kotizo (laborulo) 230 FRF / 34,80 XEU
- () se vi aliĝas post la 8a de aŭgusto, aldonu 50 FRF / 7,50 XEU
- () se vi estas pli ol 30-jara, aldonu 50 FRF / 7,50 XEU
- () se vi loĝas ekster Francio (francoj aŭ ne), duonpreze de ĉi-supra kotizo !

Dato : Subskribo : SUMO :

SAŬRKRAŬTA Semajnfino

- () mi estas vegetaran-in-o
- () baza kotizo (studento, senlaborulo...) 180 FRF / 27,20 XEU
- () baza kotizo (laborulo) 230 FRF / 34,80 XEU
- () se vi aliĝas post la 1a de septembro, aldonu 50 FRF / 7,50 XEU
- () se vi estas pli ol 30-jara, aldonu 50 FRF / 7,50 XEU
- () se vi loĝas ekster Francio (francoj aŭ ne), duonpreze de ĉi-supra kotizo !

Dato : Subskribo : SUMO :

MUNĴETADA Semajnfino

- () mi estas vegetaran-in-o
- () baza kotizo (studento, senlaborulo...) 150 FRF / 22,70 XEU
- () baza kotizo (laborulo) 200 FRF / 30,30 XEU
- () se vi aliĝas post la 1a de oktobro, aldonu 50 FRF / 7,50 XEU
- () se vi estas pli ol 30-jara, aldonu 50 FRF / 7,50 XEU
- () se vi loĝas ekster Francio (francoj aŭ ne), duonpreze de ĉi-supra kotizo !

Dato : Subskribo : SUMO :

Gastronomiaj Semajnfinoj

1998 en Francio...

ĈOKOLADA Semajnfino

SAŬRKRAŬTA kaj KIŜA Semajnfino

MUNĴETADA Semajnfino

“Laŭdire, plej bone oni malkovras kulturon ĉetabla”

Les rencontres gastronomiques d'Espéranto-Jeunes sont l'occasion de découvrir les cultures de nos régions, au travers des thèmes gastronomiques mais aussi par les contacts avec des associations locales. Parmi celles-ci, Artisans du Monde nous fera profiter de ses produits naturels et de son éthique d'un commerce équitable pour une plus grande solidarité à l'échelle de la planète. Partout la vie associative revêt une importance particulière pour sensibiliser les jeunes en faveur de leur culture régionale. Nous aurons ainsi l'occasion de découvrir une langue au cours de chacune des trois rencontres de l'automne 1998.

Comme nous serons à chaque fois près d'une frontière, nous invitons les nouveaux espérantophones de chaque côté de ces barrières imaginaires à profiter de ces occasions pour pratiquer la langue internationale pour leur plus grand plaisir.

La Gastronomiaj Semajnfinoj de JEFO estas okazoj por malkovri kulturojn de niaj regionoj tra la gastronomiaj temoj kaj ankaŭ per la kontaktoj kun lokaj asocioj. Inter tiuj, Metiistoj de la Mondo profitigos nin pri siaj naturaj produktoj kaj sia etiko de justa komercado por pli granda solidereco mondscale. Ĉie la asocia vivo gravas por atentigi la junulojn favore al ilia regiona kulturo. Tiel ni havos okazon malkovri unu lingvon dum ĉiu el la tri aŭtunaj aranĝoj de 1998.

Ĉar ni estos ĉiufoje proksime de iu landlimo, ni invitas la novulojn el ambaŭ flankoj de tiuj imagaj bariloj profiti tiujn okazojn por praktiki la internacian lingvon por ilia plej granda plezuro.

ĈOKOLADA

Semajnfino

4-6 septembro 98 • Isques • apud Boulogne-sur-Mer

JEFO denove okazigas Ĉokoladan Semajnfino. Depost la unua Ĉokolada Semajnfino en septembro 1996, okazis jam pluraj Gastronomiaj Semajnfinoj kun plej diversaj temoj. Finfine revenas de la 4a ĝis a 6a de septembro 1998 la ĉokolado kiel temo de la Ĉokolada Semajnfino 2a.

Post tre longa atendado ĉiuj frenezuloj renkontiĝos por frandi ĉokoladojn blankajn, nigrajn, laktajn, kun ovojoj, migdaloj, rizo, ktp dum diskutrodoj, vagadoj, kunsidoj, ludoj, revadoj... Onidire plejbone oni malkovras kulturon ĉetabla. Laŭ ĉi tiu principo JEFO invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn ligitajn al ĉokolado. Proksime de Belgio, Nederlando kaj Britio estos ŝanco por renkontiĝi translime. Niaj eksfranciaj amikoj ĝuos specialajn kondiĉojn.

Same kiel ni aranĝas por ĉiuj Gastronomiaj

Semajnfinoj publikiĝos la receptareto de la semajnfino. Viaj receptoj interesas ĉiujn frandemulojn. Vi do proponu ilin al la organizantoj por preparado dum la renkontiĝo.



Pikarda

Durant chés "rincontes mingeoères" d'Espéranto-Jeunes, oz ons idèe d'apprenne él tchulture éd chés poéyis, in rbéyant la


huisine, bié seur, mais étou in no dvisant avec édz achuchons du u. Ch'est comme o qu'chés "Artisans du Monde" i no donneront zout d'leus productions natures, et pi qu'i noz asplitchront leu énière éd vir pour indjincer ch'commérce du monne intieu d'sorte t'échl éyude al fuche égale pour tértous édsu la Tèrre. Tout parut, la Vie d'chés achuchons al porte partitchuyéremint à épénir és jannes gins à rapport à l'tchulture éd leu poéyi. Du coup, oz srons démucher un nouveu pérlage au fil éd satchène éd chés és rincontes d'échl aprézeut 1998. Vu qu'à chaque coup oz srons ut preu d'ène frontière, oz invitrons chés nouveux bérdeux d'espéranto des deux cotés d'chés limites maginées, qu'i peuchi't édon vuir oz dviser din no péroli intèrnationnal pour leu pu grand plaisir.

Ni gustumados diversajn specojn el diversaj fabrikistoj. Ankaŭ en surprizigaj preparaĵoj ĉokolado aldonos ekzotikan guston. Jam pretas recepto, kiu kunligas la tradicion de Bulonjo-ĉe-Mar (ĉefa fiŝkaptada haveno de Francio) kaj la temon de la renkontiĝo.

Historio kaj estonteco

Bulonjo-ĉe-Mar gravas en la historio de la esperanta movado pro la unua Universala Kongreso en 1905. 1998 gravas por la franca esperanta movado pro la centjariĝo de la asocioj celantaj al disvastigo de nia lingvo. Dum okazigo de la Ĉokolada Semajnfino 2a apud Bulonjo-ĉe-Mar, ni pridiskutos la agadojn de JEFO dum la venontaj jaroj ĝis 2005.

Tiaj renkontiĝoj estas specifaĵo de la esperanto-junularo en Francio : internacia etoso kun iom-post-ioma enkonduko al uzado de Esperanto, samtempe gustumante frandaĵojn.



Aliĝilo al la ĈOKOLADA Semajnfino

Familiá nomo : _____ Persona nomo : _____

Adreso : _____

_____ Lando : _____

Nask. : _____ () ina () malina Telefono : _____

Telefakso : _____ Retadreso : _____

Aliĝilo al la SAŬRKRAŬTA Semajnfino

Familiá nomo : _____ Persona nomo : _____

Adreso : _____

_____ Lando : _____

Nask. : _____ () ina () malina Telefono : _____

Telefakso : _____ Retadreso : _____

Aliĝilo al la MUNĴETADA Semajnfino

Familiá nomo : _____ Persona nomo : _____

Adreso : _____

_____ Lando : _____

Nask. : _____ () ina () malina Telefono : _____

Telefakso : _____ Retadreso : _____

KIEL ALIĜI ?

1. Plenigu ambaŭflanke la aliĝilo(j)n de la dezirata(j) renkontiĝo(j), kiu(j)n vi trovos dekstre
2. Legu la atentigojn kaj sendu la aliĝilon kun via (antaŭ)pago al la adreso indikata ĉi-sube.

Atentigoj por ĉiuj semajnfinoj :

Kunportu dormosakon. *Antaŭpago* : 50 FRF. Eksterlandanoj povos pagi surloke por ŝpari banko-kostojn. Se vi malaliĝas 15 tagojn antaŭe, vi ricevas vian (antaŭ)pagon minus 50 FRF. Post tiu dato, la kotizo ne estos repagebla. La *baza kotizo* inkluzivas la vendredan kaj sabatan vespermanĝojn, la sabatan kaj dimanĉan maten- kaj tagmanĝojn kaj du tranoktojn.

Via aliĝo estas transdonebla al alia persono, se vi skribe anoncas tion. Ni alĝustigos la kotizon, kiu ne povas malaltiĝi. La nombro de litoj estas limigita : tuja kaj frua aliĝo certigas do ĉeeston. La Duan Informilon vi ricevos 15 tagojn antaŭe. Se vi ne nun scias precize, kiam vi alvenos, nepre sciigu al ni poste, ĉefe se vi venas trajne. Tiel ni povos preni vin ĉe stacidomo.

Viajn aliĝilojn vi sendu al :

Pascal Lécaille • B.P. 3019 - FR-69394 Lyon cedex 03 • Tel.+faks : +33 (0)472 36 07 14 • pascal.lecaille@wanadoo.fr

(Antaŭ)pagoj al : PoŝtĈekKonto CCP Lyon 8.929.15 H je la nomo de "JEFO LYON"

Al la UEA-konto JEFO-V kun mencio de la koncerna renkontiĝo, sed maksimume ĝis unu monato antaŭ la renkontiĝo.

ĈOKOLADA

Semajnfino



SAŬRKRAŬTA

kaj *KIŜA Semajnfino*

MUNĴETADA

Semajnfino

FESTO

Invidata Programo de UK

SAŬRKRAŬTA


kaj **KIŜA** *Semajnfino*

2-4 oktobro 98 • Diebolsheim • Elzaco

GEJ kaj JEFO kunorganizas la unuan franc-germanan gastronomian semajnfinojn. Estas tre modesta kromefiko de la kunlaborado kadre de OKEJ sed tiam ni rekte ĝuos la fruktojn de niaj strebadoj. Elzaco estas aparte


grava regiono. Ĝi estis preteksto por pluraj militoj kaj nun ĝi iĝas preteksto por amikiĝo.

De la 2a ĝis la 4a de oktobro 1998 estas nia Saŭrkraŭta kaj Kiŝa Semajnfino. Onidire plejbone oni malkovras kulturon ĉetoble. Laŭ ĉi tiu principo GEJ kaj JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn de Elzaco. Jam ni promesas reception, kiu kunligos kiŝon kaj saŭrkraŭton.



Kunlaborado inter GEJ kaj JEFO

Okaze de ĉi tiu malstreĉa renkontiĝo ni povos pridiskuti niajn agadojn ambaŭflanke de la landlimoj. Komunaj temoj traktindaj koncernas organizadon de kursoj, trejnadon de novaj aktivuloj aŭ strukturadon de lokaj agadoj. Longdaŭraj kunlaboradoj povas rilati al perretaj kursoj aŭ aliaj retaĵoj, kiuj ne postulas fizikajn kunvenojn.



Germana

Die «gastronomischen Treffen» der frz. Esperanto-Jugend bieten die Gelegenheit, Frankreichs regionale

Kulturen mit kulinarischen Themen, aber auch durch Kontakte zu lokalen Verbänden, zu entdecken. Unter anderem wird uns der Verein «Handwerker der Welt» an seinen natürlichen Produkten und seiner Ethik bzgl. fairen Handels und weltweiter Solidarität bereichern. Überall sind Vereine von besonderer Wichtigkeit, um Jugendliche sensibler für ihre regionale Kultur zu machen. So werden wir bei jedem der drei Treffen im Herbst 1998 die Gelegenheit haben, eine Sprache, und somit einen Schatz im Herzen der Menschen, zu entdecken. Da wir uns jedesmal in der Nähe einer Staatsgrenze treffen werden, laden wir die neuen Esperantosprecher beider Seiten ein, die internationale Sprache hautnah mitzuerleben und viel Spaß zu haben.

Elzaca

Die gastronomische Traffa von da junga Esperantospracher (Espéranto-Jeunes) sen a Galagaheit, die

Lawesgawohnheita von unsera Regiona za entdecca, natürlich durch die Gastronomie, awer oi durich Kontakt met lokala Vereiner. Unter dana Verinigunga geht uns Artisans du Monde die Galagaheit, sini Naturprodukt za probiara und sini Ethik von garachta Händelsmethoda za schätza, fer a grosseri Solidàrität in der Walt. Ewerall spelt s Vereinslawa a sehr wechti Roll, fer die Jugend uff ehri regional Kultur ufmerksam za mæcha. So ha mer em Herbscht 1998, em Loif von drei Traffa, die Galagaheit, a Sproch, ðalso der liabscht Schätz em Harz von da Litt za entdecca. Will mer jedesmol net witt von'ra Ländesgranz sen, læda mer die neja Esperantospracher von beida Sitta von dana Granza in, sich iis Plasier metmænder en der Internatìonal Sproch za unterhæltæ.

MUNĴETADA

Semajnfino

23-25 oktobro • Gaillac-Toulzou • apud Toulouse



JEFO denove okazigas Gastronomian Semajnfino en Okcitanio. Post la Fiŝa Semajnfino en marto, estas nun de la 23a ĝis la 25a de oktobro la Munĵetada Semajnfino. Tio estos ripoziga punkto de elstara Esperanto-semajno. Post semajno plena je esperantaj okazaĵoj, vi ĝuos ripozigan Gastronomian Semajnfino, dum kiu vi povos ĝui okcitanian gastronomian kulturon.

JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn ligitajn al Okcitanio. Proksime de Katalunio kaj Eŭskio estos ŝanco por renkontiĝi translime. Niaj eksterfranciaj amikoj ĝuos specialajn kondiĉojn.


JEFO vin invitas malkovri diversajn kulturajn aspektojn ligitajn al Okcitanio. Proksime de Katalunio kaj Eŭskio estos ŝanco por renkontiĝi translime. Niaj eksterfranciaj amikoj ĝuos specialajn kondiĉojn.

Receptareto

Same kiel ni aranĝas por ĉiuj Gastronomiaj Semajnfinoj ; publikiĝos la receptareto de la semajnfino. Viaj receptoj interesas ĉiujn frandemulojn. Vi do proponu ilin al la organizantoj por preparado dum la renkontiĝo.

Post la Universala Kongreso...

Estos okazo diskuti niajn planojn por daŭrigo de niaj agadoj por diskonigo de Esperanto en



Kasuleto

Francio. Dum okaziĝo de la Munĵetada Semajnfino, ni ankaŭ pridiskutos la agadojn de JEFO dum la venontaj jaroj.



La semajnfinejo

Etoso

Tiaj renkontiĝoj estas specifaĵo de la esperanto-junularo en Francio : internacia etoso kun iom-post-ioma enkonduko al uzado de Esperanto, samtempe gustumante frandaĵojn.

Kuirgvidado

Okazos kiel kutime dum ĉiuj gastronomiaj semajnfinoj trejnado al gvidado de kuirado. Tiuj, kiuj deziras vidi la preparadon de la pladoj, ricevos trejnadon por la tasko de ĉefkuiranto. Tiel ĉiu ajn povos lerni kiel doni indikojn kaj kunordigi plurajn kunkuirantojn.

Okcitana

Los rescontres gastronomicos d'Esperanto-Joves son l'ocasion de descubrir las culturas de las nòstras regions, al travèrs de temas gastronomicos mas tambien pels contactes ambe d'associacions locals. Demest aquelas, Artisans del Monde nos farà profièitar sos produches naturals e de la siá etica d'un comerci equitable per una mai granda solidaritat a l'escala de la planèta. Pertot la vida associativa ten una importància particulara per sensibilisar los joves en favor de lor cultura regionala. Aurèm atal l'ocasion de descubrir una lenga per cada tres rescontres a la tardor de 1998, adoncas tres maravilhas al còr del monde. Coma serèm a cada còp prèp d'una frontièra, convidam los esperanto-parlants nòus de cada man d'aquelas barrièras imaginaras a profiutar d'aquelas escasenças per practicar la lenga internacionala per lor mai grand plaser.

PANA

Antaŭ-semajnfino

22-23 oktobro • Irazein, Arrou, Ballagué • Ariège

Jen unika ŝanco malkovri regionon de Francio (iom pli sude de la Munĵetada Semajnfino) kaj plilongigi vian restadon en pirena Francio. Lokaj esperantistoj proponas al vi pasigi du tagojn kun si kaj malkovri sian vivmanieron for de urbaj zorgoj, simple kaj nemultekoste... Se vi interesiĝas pri tio, kontaktu por pli da informoj :

Christian Lavarenne, Presbytère, FR-09800 Balagué. Tel. +33 5 61 04 70 66.

Programo :

- Jaŭde : vizito de asocia muelejo en Irazein kaj preparado de la pano kun ĵus-muelita faruno. Mana knedado de la pasto kaj bakado en profesia lignofajra bakujo. Ĉe-kamena vespero kun rakontoj kaj kantoj...
- Vendrede : nova bakado ekde la 8a matene, promenado al la du aliaj vilaĝoj laŭ la padoj...



FESTO

Junulara Programo de **UK**

1-8 aŭgusto 98 • Montpellier • Okcitanio (Sud-Francio)



Ci-jare, FESTO okazos kiel junulara programo de UK.

Por partopreni, nur bezonas aliĝi al UK.

Grave : se vi estas malpli ol 20 jaroj, aliĝo estas senpaga !!!

Dum FESTO, vi povos ambaŭ ĉeesti en la ĝenerala programo de la kongreso aŭ partopreni junularajn aranĝojn. Ni zorgos pri junularaj ĉiutagaj trinkejoj, diskoteko, varmujo kaj diversaj aliaj surprizoj...

Por tiuj servoj, ni povos ĝui apartan kaj escepte komfortan lokon por niaj programeroj (15 minutojn piede de la kongresejo).

Okazos publikaj koncertoj de famaj esperanto-grupoj kaj de ne-esperantistaj grupoj (ekzemple

en okcitana lingvo), kiuj ankaŭ emas kanti en esperanto. Kaj se vi ne emas ĉiam plaĝumadi aŭ sportumi, ni aranĝas la aferon por ke vi distriĝu per migradoj, ekskursoj, diskuttrondoj...

Krom la programo, ni zorgas por proponi al junuloj malmultekostajn loĝ- kaj vespermanĝeblecojn. Tial ni rezervis amasloĝejon tre proksime de la kongresejo (7 minutojn piede). La prezoj de la amasloĝejo inkluzivas matenmanĝojn kaj ni sukcesos proponi vespermanĝojn je tre favora prezo se oni enskribiĝas antaŭe.

Venu multnombraj en Montpellier, en 1998, ni plijunigos UK-n !

Informpetoj : jefo@esperanto.org • Sylvie Roques 8, rue Jean Soula FR-31240 ST JEAN